

## La platformo „Deutsche Sprachwelt“ postulas limigon de anglalingva instruo

Okaze de la Internacia Patrinlingva Tago la platformo postulas limigon de la angla favore al aliaj lingvoj. Cetere ĝi rekomendas lerni la anglan nur kiel duan lingvon kaj fortigi la instruon de la latina. Laŭ la platformo la detruo de la lingva diverseco malutilas al la germana kaj al internacia interkompreniĝo, kaj gvidas al spirite malvasta mond-koncepto.

([www.deutsche-sprachwelt.de/berichte/pm-2011-02-21.shtml](http://www.deutsche-sprachwelt.de/berichte/pm-2011-02-21.shtml))

## La Evangelio legata

Ekde monatoj eblas spekti filmetojn kiuj proponas evangeliajn fragmentojn el la dimanĉa romkatolika liturgio. La iniciato estas farita de itala pastro, ne esperantista, kiu proponas la servon en *YouTube*. Li volonte akceptis la kunlaboron de esperantistoj, por proponi ankaŭ la esperantlingvan legadon. Retadreso: [www.ueci.it](http://www.ueci.it), poste „Videoevangelio – Vidu“ kaj daŭrigi la navigadon alklakante „YouTube“ en la kadro de la fenestreto, por trovi aliajn tekstojn. Aŭ [www.youtube.com/user/laparoladidio](http://www.youtube.com/user/laparoladidio), alklaku dekstre „Evangelio en Esperanto“.

(Yahoo-grupo IKUE)

## Du filmoj pri Esperanto

Du filmoj pri E-o en 2011: unu en la franca, unu en la angla. En ambaŭ kazoj la reĝisoroj estas jam konataj pro alitemaj dokumentaj filmoj: la franco Dominique Gautier kaj la usonano Sam Green, kiu jam parte pritraktis E-on en la filmo „Utopia in Four Movements“. Intervjuo de S. Green fare de Chuck Smith, la fondinto de la Esperanto-versio de Wikipedia, aperis ĉe Libera Folio sub la titolo „Nova dokumenta filmo pri E-o“.

([www.liberafolio.org/2011/nova-dokumenta-filmo-pri-esperanto](http://www.liberafolio.org/2011/nova-dokumenta-filmo-pri-esperanto)).

(H. Masson)

## Gramatika kontrolilo por Open Office

La gramatika kontrolilo LingvoIlo-1.2 (LanguageTool-1.2) nun funkcias en la lingvo internacia inter multaj aliaj lingvoj. LingvoIlo estas libera (LGPL) plurlingva gramatika kontrolilo por OpenOffice. Ĝi ankaŭ funkcias el komanda linio por tiuj, kiuj preferas ne uzi OpenOffice. Pli da informoj:

<http://dominiko.livejournal.com/tag/lingvoilo> (Dominique Pellé)

## Monda Socia Forumo en Dakaro

UEA registriĝis kiel partoprenanto de la Monda Socia Forumo en Dakaro. Reprezentis UEA-n Mireille Grosjean, kiu trovis tri kundeĵorantojn inter la senegalaj esperantistoj. Jen jam la tria fojo, ke UEA reprezentigas en afrika Monda Socia Forumo: Bamako, Najrobo, Dakaro.

(Gazetaraj Komunikoj de UEA)

## Herzberg, la Esperanto-urbo

En 2010 okazis multaj internaciaj kaj kulturaj eventoj rilate al E-o en Herzberg. Kelkcent homoj el pli ol 20 landoj denove pro E-o vizitis la „verdanan urbeton“. La biblioteko kun arkivo denove kreskis kaj nun apartenas

al la plej gravaj en la mondo. Grava atingo estas „Fondaĵo Esperanto-urbo Herzberg“, kiun estras la urbestro Walter mem. Alia atingo por GEA resp. E-o en Germanio estas la konstanta „Esperanto-ĉambro“ en la bela kastela muzeo. Jen urĝaj petoj rilate al financa subteno: 1) 200,00 € oni bezonos por produktado de 10.000 novaj flugfolioj (en la germana pri E-o) 2) 600,00 € por nova kopiilo. 3) Pli ol 1000,00 € por la deviga plibeligo de la konstanta „Esperanto-ĉambro“ en la kastela muzeo. Tio estos unufoja investo por multaj jaroj kaj servos al la tuta movado, ĉar venos gastoj el multaj landoj al la muzeo. Oni povas ĝiri sumon al „Esperanto-Gesellschaft Südharz“ konto-numero: 101457927, bankindikilo: 26351015. IBAN: DE282635101501457927 BIC: NOLADE21HZB.

(Petro Zilvar, Zsófia Kóródy, Harald Mantz, [www.esperanto-urbo.de](http://www.esperanto-urbo.de))

## Nova forumejo por programistoj

Vilius Normantas kreis la forumon ĉe <http://programistoj.net> kiel lokon por programistoj kunveni kaj babili en E-o. La forumejo estas tute nova, certe ankoraŭ multo mankas al ĝi. Proponoj kaj ideoj estas atendataj.

(Ret-Info [www.eventoj.hu](http://www.eventoj.hu))



Urbestro Walter rigardas la historiajn materialojn

## 11 esperantistoj reprezentas UEA ĉe UNO

Kadre de siaj oficialaj rilatoj kun Unuiĝintaj Nacioj UEA rajtas akrediti reprezentantojn ĉe la oficejoj de UN. Surbaze de la decido de la Estraro la Ĝenerala Direktoro liveris al la monda organizaĵo rajtigilojn por 11 reprezentantoj en 2011. Inter ili estas: H. Tonkin, N. Blonstein, Th. Eccardt, Sc. Page, H. M. Maitzen, St. Keller, Ch. Common, N. Margot kaj F. Reale.

(Gazetaraj Komunikoj de UEA)

## Plu kreskas la Vikipedio en Esperanto

Tri tagojn post la 10-jara jubileo de la Vikipedio-projekto (15.01.2011) la Esperanta Vikipedio atingis 140.000 artikolojn. Nuntempe la E-versio de la vaste konata internacia projekto enhavas pli ol 30 milionojn da vortoj, simile granda kiel multvolumaj paperaj enciklopedioj. Ĝi aktuale okupas laŭ la nombro de artikoloj la 26an lokon kompare kun alilingvaj versioj de la reta Vikipedio. Lu Wunsch-Rolshoven,

EsperantoLand,

<http://esperanto.org/Ondo/Ind-liro.htm>

## Statistiko pri libroproduktado

Dum la jardudeko 1991–2010 aperis ne malpli ol 4020 libroj en/pri E-o kun la suma paĝonombro 527.892; plej multajn librojn dum ĉi tiu periodo eldonis UEA, sed laŭ la paĝonombro avangardas FEL. Plej multaj libroj aperis en Francio, sed pli multe aperis sume en la landoj de la eksa Sovetunio.

(La Ondo de Esperanto,

<http://esperanto.org/Ondo/Ind-liro.htm>)

## Finiĝis la Esperanto-elsendoj de Pola Radio

Post pli ol 50-jara historio de la E-redakcio de Pola Radio la lasta elsendo estis publikigita rete 31.01.2011, kaj pliaj elsendoj ne okazos. La estraro de

Pola Radio decidis, ke la sola dungito de la E-redakcio, Gabi Kosziarska, ekde nun havos aliajn taskojn. Ekde majo pasintjare la E-elsendoj estis produktataj grandparte per volontulaj fortoj, 3-foje semajne.

([www.liberafolio.org/2011/finigis-la-esperanto-elsendoj-de-pola-radio](http://www.liberafolio.org/2011/finigis-la-esperanto-elsendoj-de-pola-radio))

## NASK 2011: sama kurso en nova vesto

La Nord-Amerika Somera Kursaro de E-o (NASK) ŝanĝas la formaton de la 42-a sesio en 2011. Anstataŭ la 3-semajna, NASK okazigos mallongan sesion de nur 7 tagoj de intensa instruado dum la usona feria semajno de la 4-a de julio (2-10 julio 2011). Tiu ŝanĝo estas farita por allogi la lernantojn kiuj ne havas sufiĉe da feria tempo aŭ mono por pli longa sesio. La loko, la Universitato de Kalifornio, San Diego, restas la sama. B. Dockhorn el Germanio, B. Wennergren el Svedio kaj L. Miller el Usono planas divers-nivelajn kursojn ĉiutage kun kromaj programeroj en la posttagmezo kaj vespero.

(<http://esperantic.org/eo/edukado/nask>)

## Virtuala muzeo-vizito (Subirats, Hispanio)

Por tiuj kiuj ŝatus viziti la E-muzeon en Subirats, Hispanio, sed ankoraŭ ne trafis la oportunan tempon, oni elektis kelkajn E-specimenojn por montri en lumbilda serio ĉe la retpaĝaro

<http://karulo.wordpress.com/>

## Junaj Verduloj uzas E-on en sia deklaro

La Eŭropa Federacio de la Junaj Verduloj (FYEG) enmetis la tradukon pri sia deklaro en Esperanto. Ĝi estas la kvara lingvo en kiu la deklaro aperas:

[www.fyeg.org/main/index.php/about-fyeg#esperanto](http://www.fyeg.org/main/index.php/about-fyeg#esperanto)

(M. Westermeyer, Eŭropa Bulteno 1/11)

## Radio Vatikana 80-jara

Radio Vatikana solenas sian 80-jariĝon ekde la inaŭguro, okazinta la 12an de februaro 1931. La solenado okazas per diversaj iniciatoj, ekde konstanta ekspozicio ĉe la Vatikana Muzeoj ĝis la eldono de libro kiu trairas la historion de la radio dum la papadoj de Johano Paŭlo la 2a kaj de Benedikto la 16a. Kiel konate, en la lastaj 34 el tiuj 80 jaroj ĉeestas ankaŭ E-o, kiu „estas bone konata“ de la nuna papo. Dokumentadajn filmojn, fotojn, sondatenarojn pri la historio de RV oni trovas en plurlingva portalo

[www.radiovaticana.org](http://www.radiovaticana.org).

(C. Sarandrea [www.ikue.org](http://www.ikue.org))

## Nova aŭtomata tradukilo el la franca al E-o

Aperis aŭtomata tradukilo el la franca al E-o, libere uzebla ĉe <http://apertium.saluton.dk>. La tradukilo estas bazita sur *Apertium*, rimedaro por konstrui aŭtomatajn tradukilojn, per kiu jam funkcias tradukiloj el la kataluna, hispana kaj angla al E-o kaj de E-o al la angla. Per *Apertium*, kiu estas programaro malfermfonta kaj libera, same uzanta liberajn datumarojn, funkcias ĝis nun 42 tradukiloj.

([http://groups.google.com/group/apertium\\_eo](http://groups.google.com/group/apertium_eo) Hèctor Alòs i Font)

## Eventeo solenas la 2000an artikolon

Tiu ĉi senkosta esperantlingva retejo, kreita en 2007, havas la celon diskonigi tutmondajn novaĵojn pri la plej diversaj temoj al esperantlingva legantaro. Informoj kun rilato al E-o aŭ la E-movado ne aperas. La novaĵoj kiuj aperas en Eventeo devenas el la plej diversaj fontoj de la internacia gazetaro, kompilitaj, resumitaj kaj tradukitaj Esperanten. Komence de marto oni tie publikigis precize 2000 artikolojn.

([www.eventeo.net](http://www.eventeo.net))

**Kolektis kaj prilaboris**  
**Uwe Stecher**